# BULTENO

## DE LA INTERNACIA LABOR-OFICEJO

N-ro 26 | Aprilo | 1928

Aperas ĉiudumonate kiel aldono al « ESPERANTO » | Redaktejo: BUREAU INTERNATIONAL DU TRAVAIL, GENEVE

TEKSTO : 38-a kunsido de la Administra Konsilantaro de la Internacia Laboroficejo. — Ses novaj konfirmoj de Internaciaj Laboraj Konvencioj. — La Poŝtajaro de la Internacia Laboroficejo. — Vojaĝo de la Vicdirektoro en Sud-Afriko. — Raporto pri nedeviga asekuro kontraŭ malsano. — La Internacia Laboroficejo kaj la Rusaj kaj Armenaj Rifuĝintoj. — La salajroj en Usono triobliĝis en dudek jaroj. — Pago pri Kooperado.

### La 38a. Kunsido de la Administra Konsilantaro de la Internacia Laboroficejo.

La Administra Konsilantaro de la Internacia Laboroficejo kunvenis en sia 38-a kunsido de la 1a al la 4-a de Februaro 1928 sub la prezido de S-ro Arthur Fontaine. La plej grava temo de ĝiaj diskutoj estis la propono de la Brita Registaro por la revizio de la Washingtona Konvencio pri la okhora labortago.

Tiu projekto de konvencio, kiel ĉiuj akceptitaj de la Konferenco, enhavas artikolon ordonantan, ke la Administra Konsilantaro, unu fojon en ĉiuj dek jaroj, prezentu raporton al la Konferenco pri la funkciado de la konvencio kaj konsideru ĉu konvenas meti en la tagordon de la Konferenco la demandon pri revizio. La reprezentanto de la Brita Registoro, S-ro Betterton, Parlamenta Sekretario de la Brita Ministerio de Laboro, proponis ke la demando pri revizio de la okhora konvencio estu metata en la tagordon de la Kunsido de la Konferenco okazonta en 1929.

S-ro Betterton argumentis, ke la malfacilaĵoj, kiuj troviĝis pri la konfirmo de tiu konvencio, pruvas, ke ĝi ne estas ĝenerale akceptinda en ĝia nuna formo. La intenco de la Brita Registaro estas, klopodi por redakti konvencion, konservantan la principojn de la Washingtona projekto, sen la malfacilaĵoj trovitaj en ĉi tiu. Se oni sukcesos fari tian konvencion, la Brita Registaro estos preta por kuniĝi kun aliaj industriaj ŝtatoj, konfirmante kaj efektivigante ĝin.

Tiu propono kompreneble elvokis tre vivan diskuton. Ĉiuj laboristaj reprezentantoj kaj la plimulto de la registaraj reprezentantoj kontraŭstaris la vidpunkton de la Brita Registaro. Finfine la Konsilantaro akceptis du rezoluciojn, proponitajn de S-ro Picquenard, reprezentanto de la Franca Registaro. La unua, akceptita per 15 voĉoj kontraŭ 6, kun unu sindeteno, diras :

« La Administra Konsilantaro komisias al la Komitato pri Regularo, prezenti al ĝi, en ĝia sekvonta kunsido, raporton pri la proceduro uzota pri proponoj por la eventuala revizio de konvencioj, konsiderante la kondiĉojn, kaj de la konvencioj mem, kaj de la konstitucio, de la Internacia Labora Organizaĵo. »

La Komitato pri Regularo kunvenos la 30-an kaj 31-an de Marto por konsideri tiun demandon.

La dua rezolucio, akceptita per 13 voĉoj kontraŭ 7, kun 4 sindetenoj, estas la jena :

« La Administra Konsilantaro decidas, meti en la tagordon de sia sekvonta kunsido, post la konsiderado de la ĝenerala proceduro por revizio, la demandon, ĉu la revizio, proponita de la Brita Registaro, de la Konvencio pri Laborhoroj estu metata en la tagordon de la Konferenco en 1929. »

Laŭ antaŭaj decidoj de la Konsilantaro, du kunsidoj de la Konferenco okazos en 1929, unu ĝenerala kaj unu speciala por maraj demandoj : La Konsilantaro devis konsideri, ĉu la du kunsidoj okazu en diversaj tempoj de la jaroj aŭ ĉu ili sekvu. La Konsilantaro decidis, ke la mara kunsido malfermiĝu tuj post la ĝenerala kunsido.

La tagordo de la mara kunsido estis jam starigita. Ĝi entenas la jenajn demandojn : reguligo de la laborhoroj surŝipe ; protekto de maristoj okaze de malsano (inkluzive kuraco de maristoj vunditaj surŝipe) kaj plibonigo de la vivkondiĉoj de la maristoj dum ilia restado en havenoj.

La Tagordo de la ĝenerale kunsido ne estis ankoraŭ fiksita definitive. Oni decidis en Berlin en Oktobro por la demando pri la deviga laboro de indiĝenoj. Nun oni diskutis pri la demandoj aldonotaj. La Konsilantaro decidis por la demando pri la laborhoroj de komizoj kaj oficistoj.

La Konsilantaro diskutis peton, faritan de la Internacia Asocio de Oficiroj de la Komerca Maristaro, okaze de la kolizio de la Franca ŝipo « Lotus » kun la Turka ŝipo « Boz Kourt » kaj de la decido de la Konstanta Juĝistaro de Internacia Justeco pri tiu afero. La peto deziris, ke la Konsilantaro proponu al la Mara Konferenco en 1929 la demandon pri la starigo de internaciaj reguloj rilataj al la punoj por profesiaj kulpoj faritaj sur la maro kaj la tribunaloj kompetentaj por juĝi pri tiaj kulpoj, ankaŭ pri la atestoj de profesia kapableco, kiuj devas esti postulataj por oficiroj komandantaj. La celo de la propono ne estis, kritiki la decidon de la Juĝistaro, sed plenigi, per internaciaj reguloj, iujn mankojn en internacia juro malkovritajn okaze de la « Lotus » afero.

La Konsilantaro notis la peton. La Direktoro studos la rezultantan demandon pri kompetenteco kaj konsiliĝos kun la Sekretariaro de la Ligo de Nacioj pri la konvena proceduro. Oni ankaŭ petos la Komunan Maran Komisionon, esprimi ĝian opinion pri la afero.

### Ses novaj konfirmoj de Internaciaj Laboraj Konvencioj.

La Internacia Laboroficejo estas sciigita pri ses novaj konfirmoj de internaciaj laboraj konvencioj.

Francujo konfirmis la Konvencion pri la minimuma aĝo por allasi junulojn al laboro kiel hejtistoj kaj karbordigistoj. Tiu konvencio estis akceptita de la Internacia Labora Konferenco en ĝia tria kunsido (Genève, 1921). Ĝi estis jam konfirmata de dekkvin Ŝtatoj.

Hindujo kaj Belgujo konfirmis la konvencion pri la simpligo de la inspekto de elmigrantoj surŝipe. Tiu konvencio estis akceptita de la Konferenco en ĝia oka kunsido (Genève, 1926). Ĝi estis jam konfirmita de du Ŝtatoj, Nederlando kaj Aŭstrujo, senkondiĉe, kaj de Granda Britujo kondiĉe.

Germanujo konfirmis la projekton de konvencio pri asekuro kontraŭ malsano por laboristoj en industrio kaj komerco kaj por domservistoj kaj la projekton de konvencio pri asekuro kontraŭ malsano por agrikulturaj laboristoj.

Tiuj du projektoj de konvencio estis akceptitaj de la Internacia Labora Konferenco, dum ĝia lastpasinta kunsido, le 15-an de Junio 1927.

Ĉiu Ŝtato konfirmanta le unuan de tiuj projektoj sin ŝuldigas starigi devigan asekuron kontraŭ malsano por laboristoj, oficistoj kaj lernantoj en industriaj kaj komercaj establaĵoj, kaj por personoj laborantaj hejme kaj la domservistoj.

Ĉiu Ŝtato konfirmanta la duan projekton sin ŝuldigas starigi devigan asekuron kontraŭ malsano por laboristoj, oficistoj kaj lernantoj en agrikulturaj establaĵoj.

Ĉiu Stato konfirmanta la du projektojn sin ŝuldigas efektive asekurigi kontraŭ la risko de malsano ĉiujn salajrulojn de ciuj kategorioj, kun escepte de la maristoj kaj fiŝkaptistoj. La demando pri ĉi tiuj klasoj de laboristoj estos ekzamenata en unu sekvonta kunsido de la Konferenco, kunsido aparte dediĉata al problemoj pri mara laboro.

Germanujo, kies reprezentantoj en la Konferenco partoprenis tre aktive en la diskutado kaj akcepto de la projektoj de konvencio pri asekuro kontraŭ malsano, estas la unua Ŝtato konfirminta la projektojn, kaj tion ĝi faris treege rapide.

La Registaroj de Latvio kaj de Luksemburgo jam rekomendis al iliaj parlamentoj la konfirmon de tiuj projektoj de konvencio, kies efektivigo en kiel eble plej multe de landoj konsistigus unu el la plej dezirindaj rezultatoj de la agado de la Internacia Labora Organizaĵo.

Francujo konfirmis la projekton de konvencio pri la dungigo de maristoj. Tiu projekto de konvencio estis akceptita de la Konferenco dum ĝia Dua Kunsido en Genova en 1920. Ĉiu Ŝtato konfirmanta ĝin sin ŝuldigas starigi kaj subteni efikan kaj sufiĉan sistemon de publikaj dungoficejoj por maristoj. La dungigo de maristoj devas ne esti farata kiel komerca entrepreno por mongajno de iu ajn persono, kompanio aŭ establaĵo, kaj neniu pago devas esti postulata de iu ajn persono, kompanio aŭ establaĵo por la dungigo de iu ajn maristo sur iu ajn ŝipo. La konvencio estis jam konfirmita de 13 Ŝtatoj.

Kun tiuj novaj konfirmoj la tuta nombro da konfirmoj de internaciaj laboraj konvencioj fariĝas 257.

---

## La Poŝtaĵaro de la Internacia Laboroficejo.

La evoluado de la agado de la Internacia Laboroficejo montriĝas ĉiujare per la kresko de ĝia poŝtaĵaro.

Dum 1927, la Oficejo ricevis 35.715 leterojn skribitajn en 21 lingvoj. En 1926, ĝi ricevis 33.249. Granda Britujo, en 1927, sendis preskaŭ 5.000 leterojn al la Oficejo, kompare kun 4 000 en 1926 kaj 3.400 en 1924. Francujo sendis 4.758 en 1927, 3.400 en 1926, kaj 3.000 en 1924. Germanujo sendis 3.597 en 1927, 3.237 en 1926, kaj 1.744 en 1924. La Oficejo korespondas ne nur kun proksimaj landoj: pli ol 500 leteroj alvenis al ĝi en 1927, el Japanujo, 200 el Brazilio, 200 el Ĉinujo, 150 el Ruslando.

La Oficejo sendis 33.687 leterojn en 1927, kompare kun 32.055 en 1926.

---

## La voyaĝo de la Vicdirektoro en Sud-Afriko.

S-ro H. B. Butler, Vicdirektoro de la Internacia Laboroficejo, jus revenis de sia dumonata vojaĝo en Sud-Afriko, kie li estis gasto de la Unuiĝo.

Lia vojaĝo estis aranĝita de la Departemento de Laboro tiel, ke li povis klarigi la agadon de la Internacia Labora Organisaĵo al la asocioj de patronoj kaj laboristoj kaj al la granda publiko en Capetown, Pretoria, Johannesburg, Bloemfontein, Durban kaj Port Elisabeth. Li ankaŭ vizitis la indiĝenajn teritoriojn kaj sin informis, en la lokoj mem, pri la ideoj de la asocioj de laboristoj, blankaj kaj koloritaj, rilate la laboraj problemoj en tiuj landoj.

Dank' al la afableco de la Ĉambro de Minejoj, S-ro Butler povis sciiĝi pri la laborkondiĉoj en la oraj minejoj, la aranĝoj por la rekrutigado kaj kuracado de la indiĝenoj okupataj en la Rand kaj la organizo strarigita de la Registaro por kontraŭbatali la ftizon de la ministoj.

Post la vojaĝo en la Unuiĝo, S-ro Butler faris mallongan viziton al Suda Rhodesio, invite de la Registo. Ankaŭ en tiu rapide evoluanta kolonio, li povis studi la laborkondiĉojn, iom diferencajn de tiuj de la Unuiĝo, kaj la interesajn projektojn de la Registaro por la teknika kaj agrikultura instruado de la indiĝenoj.

S-ro Butler trovis ĉie, ke la publiko kaj la gazetaro tre interesiĝis pri la laboro de la Internacia Labora Organizaĵo, kaj speciale pri la devigata laboro. Kvankam ne ekzistas devigata laboro en la Unuiĝo de Sud-Afriko, aŭ en Suda Rhodesio, oni komprenas, ke la Konferenco de 1929, sekvante la akcepton de la Konvencio pri Sklaveco en la Kunveno de la Ligo de Nacioj en 1926, markos novan stadion en la evoluado de la problemo pri indiĝena laboro, al kiu la Registaroj de la du Ŝtatoj dediĉas grandan atenton. Tiu problemo, pro la konkurado inter la diversaj Sudafrikaj landoj, havas ja aspektojn internaciajn.

---

## Raporto pri Deviga Asekuro kontraŭ Malsano.

La Internacia Laboroficejo eldonis sian raporton pri deviga asekuro kontraŭ malsano. Ĝi estas volumo kun preskaŭ 800 paĝoj kaj konsistigas sisteman studon internacian utilan pri la esencaj aspektoj de tia asekuro : amplekso kaj financiaj rimedoj kaj administrado : institucioj kaj kontrolaŭtoritatoj, punindaĵoj kaj punoj ; la situacio de fremdaj laboristoj.

La Oficejo preparis tiun verkon laŭ la principoj difinitaj en la rezolucio de la Internacia Labora Konferenco en la kunsido en 1925, resolucio kiu invitis la Oficejon daŭrigi ĝian kolekton de informo pri socia asekuro. La raporto resumas 350 leĝojn kaj regularojn kaj 220 raportojn kaj aliajn verkojn en ĉirkaŭ dekkvin lingvoj.

Ŝajnas el la raporto, ke la sano de la laboristaj familioj konstante pliboniĝas rezulte el asekuro kaj ke la produkta kapableco de la laboristoj pligrandiĝas, dank' al la plilarĝigo de la klaso de asekuritoj, la kompletigo de la utiloj por plenumi la tri celojn : helpon, kuracon kaj antaŭforigon, la centrigo de monrimedoj kaj la sistema organizo de aŭtonomiaj institucioj, administrataj de la interesatoj.

Oni jam scias, ke la Internacia Labora Konferenco, en ĝia Deka Kunsido en 1927, sur la bazo de la respondoj de la Registaroj al la demandaro de la Oficejo kaj de informoj kolektitaj de la Oficejo, akceptis Projekton de Konvencio pri Asekuro kontraŭ malsano por laboristoj en industrio kaj komerco kaj por domservistoj, Projekton de Konvencio pri Asekuro kontraŭ malsano por agrikulturaj laboristoj kaj Rekomendon pri la ĝeneralaj principoj de socia asekuro.

---

## Raporto pri nedeviga asekuro kontraŭ malsano.

La Internacia Laboroficejo ĵus eldonis gravan studon pri nedeviga asekuro kontraŭ malsano, kiel plenigan aldonon al sia raporto pri deviga asekuro.

La studo montras, ke nedeviga asekuro progresas malrapide, malgraŭ konstantaj klopodoj por kreskigi ĝin. La proporcio de asekuritoj al la tuta loĝantaro en 1923, 1924 aŭ 1925 estis nur 6,63 % en Francujo, 9 % en Australio, 2 % en Italujo kaj Finlando, 3 % en la Unuiĝo de Sud-Afriko (blanka loĝantaro), 1 % en Kanado, 1,87 % en Hispanujo, 11,94 % en Svedujo kaj 14,31 % en Belgujo. Generale la rezultatoj ne estas kontentigaj, escepte en Danujo kaj malpli multe en Svislando, kie eksistas specialaj cirkonstancoj.

Generale estas la pli malriĉaj salajruloj, kiuj ne estas asekurataj, tio estas, tiuj, kiuj, pro malbonaj vivkondiĉoj, estas plej malŝirmataj kontraŭ malsano. Krom la malgranda nombro da asekuratoj, la sumo disponebla por kompensoj estas ĉiam ne sufiĉa. Estas ankaŭ neeble starigi efikan kuracistan servon kaj sanigajn instituciojn, kaŭze de la disigataj klopodoj.

Ŝajnas, ke la sola efika rimedo estas deviga asekuro, kiu jam ekzistas en multe da landoj, inkluzive Germanujo, Granda Britujo, Norvegujo, Sudslavujo, Rumanujo, Ĉeĥoslovakio, Bulgarujo, Aŭstrujo, Polujo, Greklando, Ĉilio kaj Japanujo. Tiu estas ankaŭ la opinio esprimita de granda plimulto en la Deka Kunsido de la Internacia Labora Konferenco en 1927, kiam oni starigis la unuan internacian regularon pri malsanasekuro laŭ la deviga principo.

---

## La Internacia Laboroficejo kaj la Rusaj kaj Armenaj Rifuĝintoj.

Unu el la plej malfacilaj problemoj de la postmilitaj jaroj estas nun solvata per la dungigo de Rusaj kaj Armenaj rifuĝintoj dank' al la klopodoj de la Ligo de Nacioj kaj la Internacia Laboroficejo. Je la fino de 1918 troviĝis en Siberio preskaŭ duonmiliono da militkaptitoj kaj enkarcerigitaj militistoj vivantaj en granda mizereco kaj sen ri-

medoj por reveni al la patrolando. La Ligo de Nacioj komisiis al D-ro Nansen, kiel Alta Komisiisto, la organizon de la reenpatrujigo de tiuj kaptitoj. Liaj klopodoj sukcesis tiel, ke, ĝis 1922, li aranĝis la revenon hejmen de ĉirkaŭ 450.000 kaptitoj apartenantaj al 26 nacioj.

Dume fariĝis necese, solvi la problemon starigitan per la ekzisto de 500.000 Rusaj rifuĝintoj en la diversaj Eŭropaj landoj kaj en Ĉinujo. La nombro da senokupuloj inter tiuj rifuĝintoj estis malpliigita al 200.000 ĝis 1925, kiam la dungigo de rifuĝintoj estis komisiita al la Internacia Laboroficejo. Restas nun ĉirkaŭ 180.000, por kiuj oni devas trovi okupadon. Krom tio, en 1924, ekzistis 300.000 Armenaj rifuĝintoj, el kiuj 200.000 estis senokupaj. La klopodoj de la Internacia Laboroficejo malpliigis tiun nombron al 60.000.

Entute, post la transdono de la tasko al la Internacia Laboroficejo, la nombro da senokupuloj rifuĝintaj malpliiĝis de 400.000 al 250.000. 35.000 estis senpere dungitaj en Eŭropo, Ameriko kaj Aŭstralio per la klopodoj de la Servo pri Rifuĝintoj de la Internacia Laboroficejo. La Oficejo tute lasttempe aranĝis la starigon de 5.000 Armenaj rifuĝintoj en Sirio.

---

## La salajroj en Usono trioblis en dudek jaroj.

Ŝajnas el la jara raporto de la Oficejo pri Laborstatistikoj de Usono, ke la meza kresko de salajroj en tiu lando, dum 1927, estis 4 cendoj hore.

Tiu kresko ne estas ĝenerala aŭ senescepta. El 73 profesioj, 64 montris plialtigojn kaj 9 malpliigojn.

La tabelo de mezaj salajroj dum la 20 lastpasintaj jaroj montras, ke la salajroj en 1927 estis trioble pli altaj ol estis en 1907 kaj duoble kaj duone pli altaj ol en 1913. Oni ankaŭ konstatas senĉesan malpliiĝon de laborhoroj, kies meza daŭro en 1927 estis 45 horoj semajne.

---

## Paĝo pri Kooperado.

Ni intencas de nun dediĉi unu paĝon de ĉiu numero de la Bulteno al la koopera movado, kredante ke la informoj pri tiu movado kolektataj de la Internacia Laboroficejo interesos multajn Esperantistojn. La signifo de la kooperado por la vivkondiĉoj de la laboristoj estas tre evidenta, kaj pro tio la Internacia Laboroficejo, de la unua momento de sia ekzistado, speciale atentas pri tiu fako de socia agado. La Koopera Servo de la Oficejo funkcias de la komenco, kolektante kaj disdonante sciigojn pri la movado en ĉiuj landoj. La perioda eldonaĵo « Kooperaj Informoj » aperas en Angla, Franca kaj Germana lingvoj kaj nun eniras en sian kvinan jaron. La Parto VI de la Internacia Labora Jarlibro ekskluzive koncernas la kooperajn organizaĵojn. Diversaj studoj pri kooperaj demandoj estis eldonitaj de tempo al tempo, inter kiuj estas notindaj tiuj pri la rezultatoj de iuj enketoj por kompari pomalgrandajn prezojn en privata komerco kaj en konsumkooperaj societoj kaj pri la rolo de la kooperaj organizaĵoj en la internacia komerco pri tritiko, laktaĵoj kaj aliaj agrikulturaj produktoj. Tiu fako de la laboro de la Oficejo devus speciale interesi la Esperantistojn pro la grandvalora helpo, kiun ĝi recevis per Esperanto. Kiel la legantoj de la Bulteno jam scias, la Oficejo ŝuldas al UEA kaj ĝia delegito en Islando gravajn informojn pri la koopera movado en tiu lando kaj la starigon de rilatoj kun la islandaj kooperaj organizaĵoj. Ankaŭ el Polujo venis de tempo al tempo ŝatataj sciigoj pri kooperado pere de Esperanta korespondanto.

### *La Opinion de Sir Thomas Allen pri la kooperaj societoj por la vendado de tritiko* (« Wheats Pools »).

Jen la konkludoj de artikolo de Sir Thomas Allen en la *Cooperative Official*, Decembro 1927.

Ne estas mirinde, ke la kooperaj societoj por la vendado de tritiko inspiras iom da malfido al la Britaj konsumantoj. Ili scias, ke tritiko estis ofte malprofite al la konsumantoj monopoligita de Amerikaj spekulaciistoj, kaj ili timas, ke la vendantaj kooperativoj akaparos la provizojn kaj utiligos sian povon malprofite al la konsumantoj de Granda Britujo kaj aliaj landoj. Tiuj timoj tamen rezultas de malkompreno. La agado de la agrikulturaj vendokooperativoj ne povas esti komparata kun la spekulacioj de la financistoj. Efektive la agrikulturaj produktantoj estas nur laboristoj kulturigantaj sian proprajn bienojn. Ilis celas nur gaini justan salajron por sia laboro. Iliaj organizaĵoj, kvankam ili havas alian formon ol tiu de niaj konsumkooperativoj, estas inspirataj de la sama koopera spirito. Ekzistas neniu motivo por supozi, ke tiuj vendokooperativoj iam povos reprezenti kapitalistajn interesojn aŭ klopodi por ekspluati la milionojn da konsumantoj organizitaj en la Brita koopera movado. Cetere, eĉ se ili faras tion, la organizitaj konsumantoj nepre devos trakti kun la organizitaj farmuloj, kaj interŝanĝaj rilatoj devos fariĝi inter la pograndaj societoj de la konsumantoj kaj la kooperativoj por la vendado de tritiko. La saĝo do rekomendas, ke oni plivastigu tiujn interŝanĝojn, per kiuj la propagandaj societoj povos, ne nur akiri regulajn liverojn de tritiko por la plej malaltaj prezoj de la merkato, sed ankaŭ influi sur la politiko de la vendokooperativoj kaj forigi ĉiun eblan malkomprenon. Senperaj rilatoj kun la vendokooperativoj ebligos al la Britaj kooperantoj subteni la kooperan spiriton de la « Pools » kaj konduki ilin en la internacian kooperan komercon. Multaj malgrandaj produktantoj, aktuale okupantaj respondajn postenojn en vendokooperativoj, estis anoj de kooperaj societoj antaŭ sia foriro el Granda Britujo, kaj kiu ajn konas ilin kaj renkontas ilin en Kanado, ne povas dubi, ke ili havas, laŭ ilia modo, la saman celon, kiel la granda koopera movado de niaj konsumantoj.

Ĉiuokaze la Britaj konsumantoj estus malsaĝe se ili ignorus la vendokooperativojn aŭ montrus malamikecon kontraŭ ili. Tiuj organizaĵoj ekzistas, kaj sendube ili firmigos pli kaj pli sian situacion. De jaro al jaro iliaj agoj ampleksos unu parton ĉiam kreskantan de la eksporto de tritiko el Kanado, Aŭstralio, Nova Zelando, kaj aliaj Dominioj. Kiuj estas la alternativoj ? Aŭ resti en rilatoj kun la « Pools », aŭ trakti kun spekulaciistoj, kiuj klopodas nur por gajni privatajn profitojn. Elekti la duan alternativon, estus favori la spekulacion pri la ĉiutaga pano de la Britaj laboristoj kaj kunhelpi al la evoluado de la egoistaj monopoloj, kiuj, ju pli ili progresas, des pli ili minacas la vivon kaj la pacon de la civilizita mondo. La Britaj kooperativoj devas elekti inter la du vojoj. Ne estas alia, ĉar la Brita koopera movado neniam havos la eblon, posedi kaj direkti ĉiujn fontojn de krudaj materialoj. Se ni pensas, ke ne ĉio estas plej bone en la vendokooperativoj, ni devas rekoni ke ne ĉio estas kondamninda. En ili la koopera spirito laboras ; la saĝo konsilas al ni, ke ni subtenu tiun bonfaran spiriton kaj influu sur ĝia posta disvolviĝo. Estas certe, ke la sistemo de la vendokooperativoj povas esti modifata per la sperto. Estas ĉiuokaze sendube, ke ĝi estas sistemo treege pli ekonomia kaj pli oportuna ol la antikva sistemo de spekulacio.

### *La koopera vendo de tritiko en Kanado en 1926-27,*

La vendoj de tritiko farita de la Centra Vendokooperativo de la tritikoproduktantoj en Kanado, dum la sezono 1926-1927, atingis la sumon $ 295.750.764. La negocoj ampleksis 209.501.478 buŝelojn, inkluzive la aĉetoj faritaj por kompletigi ŝarĝojn de definita kvalito kaj la provizoj rezervitaj por la sezono 1927-1928. La kvantoj liveritaj de la Provincaj societoj estis la jenaj : Manitoba, 16.208.625 buŝeloj ; Alberta, 44.282.130 buŝeloj ; Saskatchewan, 119.459.478 buŝeloj. Tiuj liveroj reprezentas, laŭ la takso de la Centra Societo, ĉirkaŭ 53 procentojn de la tuta kvanto portita al la merkato de la tri Provincoj.

124.135.308 buŝeloj estis eksportitaj al 24 landoj per 60 havenoj La landoj aĉetintaj la plej grandajn kvantojn estas:

| | | |
|---|---|---|
| Britujo kaj Irlando .......... | 50.152.558 | buŝeloj. |
| Italujo .......................... | 14.584.457 | » |
| Nederlando .................. | 13.423.454 | » |
| Germanujo .................. | 10.424.000 | » |
| Belgujo ........................ | 10.280.781 | » |
| Francujo ...................... | 8.119.411 | » |
| Japanujo ...................... | 6.422.828 | » |
| Portugalujo .................. | 1.952.000 | » |
| Greklando .................... | 1.816.000 | » |

